

Ĉapitro 3: La urbo

Adverbs

§1 Words that describe the manner of an action (or state) are called adverbs. They express the *how, why, when* or *where* of a verb.

Most adverbs are derived from adjectives. In English, adverbs often end in *-ly*. In Esperanto, they end in **-e**:

bela	<i>beautiful</i>	bele	<i>beautifully</i>
rapida	<i>quick</i>	rapide	<i>quickly</i>
forta	<i>strong</i>	forte	<i>strongly</i>
bona	<i>good</i>	bone	<i>well</i>

Subject and direct object

§2 So far we've only seen sentences without direct objects. These sentences express what a subject *does* or *is*. For example, in these sentences **la patro** is the subject:

La patro sidas en la seĝo.	<i>The father sits in the chair.</i>
La patro estas sinjoro Lang.	<i>The father is Mr. Lang.</i>

Often we're concerned not just with what the subject *does*, but what it *does to something (or someone) else*. When we *read*, for example, we must read *something*; when we *love*, we must love *something*; when we *eat* or *drink* we must eat or drink... *something*. This "something" is called the *direct object*, and in Esperanto we add **-n** to distinguish it from the subject:

Subject	Verb	Direct object
la viro	amas	la virin n
<i>the man</i>	<i>loves</i>	<i>the woman</i>

Looking at this sentence, we know who loves (**la viro**), and we know who is loved (**la virinon**, because it has the **-n**). We can even re-arrange the order of the sentence without changing its meaning: **la virinon** is still the object, no matter where it appears in the sentence.

La viro la virin on amas.	<i>The man loves the woman.</i>
La virin on amas la viro.	<i>The man loves the woman.</i>
Amas la viro la virin on .	<i>The man loves the woman.</i>
etc...	

The object can also be a pronoun instead of a noun:

La viro amas ŝ in .	<i>The man loves her.</i>
----------------------------	---------------------------

and it can be plural, too:

Maria amas la pupoj n .	<i>Maria loves the dolls.</i>
Ŝi amas il in .	<i>She loves them.</i>

Remember how adjectives “agree” with their nouns by taking the plural ending **-j**? (If not, see chapter 2, §3) In the same way, adjectives also take the ending **-n** along with their nouns:

La bela viro amas la maljun an virin on .	<i>The handsome man loves the old woman.</i>
---	--

Andreo amas la bonaj n hundoj n .	<i>Andreo loves the good dogs.</i>
---	------------------------------------

More correlatives

§3 **Kie** (*where*) and **tie** (*there, in that place*)

Kie vi loĝas?	<i>Where do you live?</i>	Mi loĝas tie.	<i>I live there.</i>
Kie li estas?	<i>Where is he?</i>	Li estas tie.	<i>He is there.</i>

§4 **Kiel** (*how*) and **tiel** (*in that way, so*)

Kiel vi fartas?	<i>How do you do (fare)?</i>
Ili ludas tiel.	<i>They play like this (in this way).</i>
Kiel li laboras?	<i>How does he work?</i>
Ĝi veturas tiel rapide!	<i>It travels so quickly!</i>

In comparing two ideas, **kiel** is translated by *like*:

Ĝi ne estas urbego, kiel Novjorko.	<i>It isn't a big city like New York.</i>
------------------------------------	---

Li ne ludas, kiel vi. *He doesn't play like you.*

The combination **tiel ... kiel ...** is translated by *as ... as ...*

Aŭto ne estas tiel granda kiel buso.

A car is not as big as a bus.

Aŭto ne veturas tiel rapide kiel trajno.

A car does not travel as quickly as a train.

Praktiko 3.1 Translate into English:

Kie estas la ludiloj de Maria? Ili estas sur la tablo antaŭ ŝi. Kion faras la patro? Li sidas kaj legas libron. Kian libron li legas? Li legas bonan libron. Li sidas komforte kaj legas rapide. Maria estas tre kontenta ĉar ŝi iras al la lernejo. Ŝi iras rapide. Sed Andreo ne estas kontenta. Li iras malrapide al la lernejo. Maria amas la lernejon, sed Andreo malamas ĝin.

Praktiko 3.2 Match the answers to the questions:

- | | |
|--|-----------------------------------|
| 1. Ĉu la brakseĝo estas komforta? | a. Li legas rapide. |
| 2. Kie estas la ludiloj de Maria? | b. Li legas libron. |
| 3. Ĉu Maria estas kontenta? | c. Ĝi estas granda. |
| 4. Kio estas sur la tablo? | d. Ne, ĝi ne estas granda. |
| 5. Kion legas sinjoro Lang? | e. Jes, ĝi estas urbego. |
| 6. Kie estas la ŝranko de Maria? | f. Ili estas sur la tablo. |
| 7. Ĉu la ŝranko de Maria estas granda? | g. La ludiloj estas sur la tablo. |
| 8. Kiel legas sinjoro Lang? | h. Ĝi estas sur la muro. |
| 9. Ĉu Novjorko estas urbego? | i. Jes, ĝi estas komforta. |
| 10. Kia estas urbego? | j. Jes, ŝi estas kontenta. |

Praktiko 3.3 Answer the following questions:

Ĉu urbego estas malgranda urbo? Kion legas sinjoro Lang? Kie sidas Maria? Kia estas la ŝranko de Maria? Kie pendas la elektra lampo? Ĉu vi loĝas kun gesinjoroj Lang? Ĉu aŭto estas tiel granda kiel trajno? Ĉu Maria estas maljuna? Kia estas la bildo en la ĉambro? Ĉu la brakseĝo estas malkomforta? Ĉu fajro estas malvarma? Kiu ludilo estas malpura? Kiu amas la patron? Kiun amas la patro? Ĉu la familio Lang konsistas el tri personoj?

Suffixes

§5 **-et-** is used as a diminutive to denote a small size or degree:

domo	<i>house</i>	dom eto	<i>cottage</i>
varma	<i>warm</i>	var meta	<i>lukewarm</i>
malvarma	<i>cold</i>	malvar meta	<i>cool</i>
dormas	<i>sleeps</i>	dorm etas	<i>dozes</i>
ridas	<i>laughs</i>	rid etas	<i>smiles</i>

§6 **-eg-** is the opposite of **-et-** and shows a great size or degree:

dom ego	<i>mansion</i>
var mega	<i>hot</i>
dorm egas	<i>sleeps heavily</i>
rid egas	<i>guffaws</i>

§7 **-ul-** denotes a person characterized by the idea of the root:

riĉa	<i>rich</i>	riĉ ulo	<i>rich person</i>
sana	<i>healthy</i>	san ulo	<i>healthy person</i>
sporto	<i>sport</i>	sport ulo	<i>sportsman</i>

We can add the suffix **-in-** to these words to indicate the feminine:

sportul ino	<i>sportswoman</i>
--------------------	--------------------

(The **-ul-** forms were once assumed to be male by default, but this is no longer true. *Sportulo* is simply a “sports-person” who can be male or female. To specify a male, we add the prefix **vir-** to make **virsportulo**.)

We can also add the prefix **mal-** to make an opposite:


malriĉ ulo	<i>poor person</i>
-------------------	--------------------

Using the suffixes we’ve learned so far, we can also make **mal-san-ul-ej-o**: “a place for sick people”, i.e., a hospital!

Text: La urbo

La bildo montras parton de urbo. Ĝi ne estas urbego, kiel Novjorko; nur malgranda urbo. Ĝi staras alte, sur monteto. La granda strato iras rekte al la centro de la urbo, la ĉefa placo. Ĉirkaŭ la placo, ni vidas la urbodomon, preĝejon kaj multajn arbojn. Kio staras en la mezo de la placo? Statuo.

Ĉe la dekstra flanko de la placo, vi trovas malsanulejon. Kontraŭ la malsanulejo staras granda domo aŭ *domego*. Tiu domo estas nun artgalerio. Ĝi staras en publika parko kaj florigardeno, kie la gesinjoroj de la urbo promenas kaj ripozas. Ankaŭ la infanoj ludas tie. Vojo kaj vojetoj kondukas tra la parko al la domego.



Sur la ĉefstrato, aŭtoj rapide veturas. Kaj kio veturas sur la ponto? Tio estas buso. Kiel veturas trajno? Ĝi veturas *rapidege*! Sub la ponto vi vidas parton de trajno, ĉar la urbo havas ankaŭ fervojon. Vi vidas la tegmenton de la fervoja stacidomo malantaŭ la ponto, ĉe la dekstra flanko de la bildo. Flanka strateto, sur kiu vi vidas kelkajn dometojn, kondukas de la ĉefstrato al la stacidomo.

Praktiko 3.4 Translate into English:

La urbo estas malgranda. Ĝi ne estas urbego, kiel Novjorko. Ĉu la stratoj estas larĝaj aŭ mallarĝaj? En la mezo de la placo staras statuo, kaj malantaŭ tio estas la urbodomo. Sur la placo estas ankaŭ granda preĝejo. Kie estas la artgalerio? Ĝi estas en la publika parko. Kaj kie estas la parko? Ĝi estas maldekstre de la ĉefstrato. Ĉe la alia flanko de la strato estas la malsanulejo. Vojetto kondukas de la ĉefstrato al la malsanulejo. Kie promenas la gesinjoroj de la urbo? Kie ludas la infanoj? La gesinjoroj promenas en la publika parko, kaj la infanoj ludas tie. Sur la ĉefstrato veturas aŭtoj kaj busoj. Kiel veturas la aŭto? Ĝi veturas rapide. Trajnoj ne veturas sur la strato; ili veturas sur la fervojo.

Praktiko 3.5 Translate into Esperanto:

Where do you live? I live in a big city. It is not as big as New York. It has two railway stations. Trains run (travel) on the railway, but cars travel on the roads. Do you have a car? Yes, I have a small car, but it doesn't go (travel) very fast. The main streets in the town are wide, but the other streets are narrow. What is the town like? It's modern and clean.

Praktiko 3.6 Here are some answers. Write the corresponding questions!

1. Ĝi veturas sur la ponto.
2. Domego staras en la parko.
3. Jes, ĝi iras rekte al la ĉefplaco.
4. La gesinjoroj promenas kaj ripozas tie.
5. Ne, trajno ne veturas sur la strato.
6. Ĝi staras sur monteto.
7. Ĝi veturas rapidege!
8. Statuo staras tie.
9. Mi vidas parton de trajno.
10. Mi vidas ilin sur flanko strateto.

Note:

Kie promenas la gesinjoroj? Where do the people walk?
Kie ludas la infanoj? Where do the children play?
Kiel veturas la aŭto? How does the car travel?

In sentences like these, the words “do” and “does” are not translated into Esperanto.

Dialogo: Promeno en la parko

It's a nice day. Mrs. Lang and Mrs. Brown are taking a walk in the town.

Sinjinorino Brown Ha! Jen ni en la placo. Ĝi tre plaĉas al mi, kun la granda preĝejo kaj la bela urbodomo.

Sinjinorino Lang Jes, ĝi estas tre bela. Ĉu ni promenu en la parko?

S-ino Brown Kia bona ideo! La vetero estas tiel bela kaj varma, kaj la ĉielo tiel blua. La publika parko plaĉas al mi.

They enter the park and sit on a bench.

S-ino Lang Kiel belaj estas tiuj floroj!

S-ino Brown Jes, plaĉas al mi la florgardeno. Nu! Kiel fartas la familio?

S-ino Lang Ho, tre bone, dankon. Kiel fartas via edzo?

S-ino Brown Li fartas bone. Li eĉ laboras en la ĝardeno ĉar la vetero estas tiel bona!

S-ino Lang Kia surprizo por vi!

S-ino Brown Jes, granda surprizo!

S-ino Lang Ĉu vi vidas tiujn hundojn?

S-ino Brown Kie?

S-ino Lang Tie, antaŭ la artgalerio.

S-ino Brown Ha, jes, mi vidas ilin nun. Ili ludas sur la vojeto kaj sub la arboj. La parko estas bona ludejo por ili.

S-ino Lang Ankaŭ por ni!

S-ino Brown Jes, sed ni ne ludas en ĝi; ni sidas kaj ripozas.

(Both together) Kaj tio plaĉas al ni!

Demandoj

1. Kia estas la vetero?
2. Kie sidas la du sinjorinoj?
3. Kiaj estas la floroj?
4. Kiel fartas la familio Lang?
5. Kion faras sinjoro Brown dum la du sinjorinoj sidas en la parko?
6. Al kiu tio estas surprizo?
7. Kiujn bestojn vidas la sinjorinoj?
8. Kie la hundoj ludas?
9. Ĉu la sinjorinoj ludas? Kion ili faras?
10. Ĉu tio plaĉas al ili?

Vortolisto

alt/a high
ankaŭ also
arb/o tree
art/o art
blu/a blue
centr/o center
ĉar because
ĉef- chief, main
ĉefstrato main street
ĉiel/o sky, heaven
ĉirkaŭ around
dekstr/a right (hand)
maldekstra left
eĉ even
fart/i to fare, be
fer/o iron
fervojo railway
flank/o side
flor/o flower
galeri/o gallery
ha! ah!
hav/i to have
ho! oh!
ide/o idea
kelkaj a few, several
konduk/i to lead, guide
kontraŭ opposite
mal'san'ul'ejo hospital
mez/o middle
mont/o mountain
monteto hill
montr/i to show
mult/a(j) many, a lot of
nu! well (then)
nur only, merely
park/o park
part/o part
plac/o square (in a town)
plaĉ/i to be pleasing
pont/o bridge

preĝ/i to pray
preĝejo church
promen/i to go for a leisurely walk,
drive, ride, etc.
publik/o public
rapid/a quick
rapide quickly
rekt/a direct, straight
ripoz/i to rest
staci/o station (radio, etc.)
stacidomo railway station (building)
statu/o statue
strat/o street
sub under, below
surpriz/i to surprise
tegment/o roof
trajn/o train
trov/i to find
urb/o town
urbego (large) city, metropolis
urbodomo town hall
veter/o weather
vetur/i to travel, go, run (in or of a
vehicle)
vid/i to see
voj/o way, road
vojeto path

Esprimoj:

Ĝi tre plaĉas al mi

I like it very much.

(literally: "It is very pleasing to me.")

Ĉu ni promenu?

Shall we go for a walk?

Kiel fartas la familio?

How is (fares) the family?

Kiel vi fartas?

How are you?